



Kurioze 'en-rampi' en Supra Dekstra angulo




Diag. 31 (Ĝusta kurso 19-29; B28: sinligi sur spuro de forkapti N23) Ek de N19, Nigro montris akran teknikon konsternantan Blankon, kaj ree konsternas Blankon ĉe la lasta limaranĝo en Supra Dekstra angulo. N29! Luj el vi legantoj devus surpriziĝi dirante "Nekredeble!" Ĉi tio estas la ne-kutima ideo menciita ĉe la diagramo de la problemo. {paĝo 379 de la originalo}


Ĉu vi komprenas la signifon de la ŝtonmeto?




Diag. 32 Multe el vi legantoj firme kredas, ke en ĉi tia formo, Nigro, se havas metrajton, devus 'sinligi' per N1 kaj N3.



Diag. 33 Se Blanko havas metrajton, Blanko 'minacas' per B1 kaj 'forkaptas' ĉe la 'duonpoenta alternekaptado'.




Diag. 34 (Mirinda 'sin-ofero') Malgraŭ la kutima ideo, Nigro 'en-rampas' kiel N1. Kompreneble Blanko 'minacas' per B2. Nigro ne povas 'sinligi' per N-a, kaj la nigraj du ŝtonoj devas forkaptiĝi.




Diag. 35 Sekve, Nigro retiras 'sinligante' per N3. Lasante Blankon forkapti du ŝtonojn per B4,...

{paĝo 380 de la originalo}



Diag. 36 Nigro 'rekaptas' per N5 kaj lim-aranĝoj finiĝas. En ĉi tiu angulo, Blanko 'forkaptis' du ŝtonojn kaj Nigro 'rekaptis' unu ŝtonon. Do ni taksu ke ĉi tie Blanko havas 1 poenton. Iu demandus, "Ĉu Nigro iel malgajnis poenton?" Tamen en ĉi tiu formo,...



Diag. 37 (Rimarkinde estas 'singardi') oni devas rimarki, ke Blanko bezonas 'singardi' en sian teritorion per B-a.

Rezulte, ĉi tiu blanka teritorio fariĝas '7 poentoj' adiciante 6 poentojn de punktoj 'b' kaj 1 poenton de la angulo. Komparante kun '8 poentoj' en diagramo 32, Nigro sukcesis malmultigi la blankan teritorion je 1 poento.

La lim-aranĝo en la Supra Dekstra angulo estas la lasta, kaj la ludo finiĝas {laŭ japana regulo}.

{paĝo 381 de la originalo}